



BULTENO DE LA JUNULARO ESPERANTISTA DE NORDAMERIKO
Numero #3 30 Ave B NYC 9, NY USONO Oktobro 1962

POR INTERESULOJ

Kara Amiko,

Pro via jam esprimita intereso pri Esperanto, evidentigita per via ebleco legi tiun ĉi leteron, eble vi ankaŭ interesigûs pri nia nova organizaĵo JEN:

La Junularo Esperantista de Nord-Ameriko aŭ JEN konsistas el junaj personoj kiuj vivas aŭ en Usono aŭ en Kanado. JEN fondiĝis en aŭgusto 1952 de junaj esperantistoj en Novjorkurbo.

JEN estas absolute memstara kaj neŭtrala organizaĵo, sed ĝi havas tre proksimajn rilatojn kun ELNA kaj aliaj lokaj kaj fakaj grupoj. Membreco en JEN estas senpaga se vi havas malpli ol tridek jaroj kaj ankaŭ se vi estas membro de ELNA aŭ UEA rekte.

Nia bulteno estas unue, altnivela legaĵo por junaj studentoj de la lingvo; due, informilo pri junulaj aferoj; kaj laste, propagandilo por nia movado.

Se vi interesigûs pri JEN kaj volas aliĝi, sendu leteron al: Richard P. Kollin (Sekretario), 30 Avenue B, New York 9, N. Y. Usono.

RPK

FLORIDA FIDEMO

Oni diras, ke nenio estas en Florido netrovebla. Mi povas atesti tion, ĉar en tiu ŝtato mi pasigis mian adoleskon; kaj mi bone memoras pri la ĉarlatanaj vendistoj, kiuj ĵadis de pordo al pordo vendante milspecajn senvalorajojn. Ilia honesto estas ĥebatebla, sed ilia saĝeco, kiel tiu de la ciganoj, estas ja rimarkinda. Unu vintron, unu el tiuj aĉuloj vendis al mia patro skatoleton kun la etikedo: "RIMEDO KONTRAU MAJSKARABOJ... RE ULTOJ GARANTITAJ SE ONI OBEAS LA INSTRUKCIOJN. NE MALFERMU ANTAU UZO." Mia patro, kiu ĝenis la majskaraboj en sia legumĝardeno, tenis la skatolon ĝis la sekva printempo. Kiam li malfermis ĝin, li trovis nur du vergetojn. Kia aparato? Sed li ekmemoris legi la instrukciojn:

- a. TENU LA SKARABON SUB UNU VERGETO.
- b. MORTBATU ĜIN PER LA ALIA.

Ĝuste tiel mia patro volis fari al la vendinto, sed tiu estis, kiel la Germanoj ĉi ras, "jam preter ĉiuj montoj..."

KLM

Akceptinte, ke la tempo estas senkomenca kaj senfina, kaj akceptinte, ke la universo ne havas limojn (almenaŭ ne en praktika senco), oni rajtas teorii, ke io ajn, kion la homa cerbo povas imagi al si, iam ie estos. Aŭ estis, aŭ eĉ estas. Kio do estas la "realo"? Ŝajne nur tio, kion hazarde spertas la homo je specifa tempo en specifa loko. En specifa universo. Sed mi gardu min, alie mi forgesos mian temon. Ĉar kiajn grandiozajn skemojn filozofias la homo nur por senkulpigi sin! Mi ankaŭ. Sed memoru tion pri specifajoj, ĉar ĝi refoje aperos dum la deliro...

Komencas la rakonto per mia adolesko, dum kio mi vivadis sufiĉe kontente en la sudusona ŝtato Florido. Ekzemple, ekde la bubeco mi neniam estis serioze malsana. Mi ĉiam havis tegmenton super la kapo, kaj ne ofte malsatis. Mia patro estis jam sufiĉe maljuna kaj batis min nur feble, pasive; mia patrino fidis al mi kaj plejparte do, mi ĝuis aŭtonomion de frua aĝo. Mi estis lasata al propra ekzamenado de la mondo, al tia versio de ĝi, kian mi povis eltrovi. Laŭ la psikologoj tio kaŭzas skizofrenion ĉe la infano. Laŭ mi, ĉiuj infanoj estas skizofreniaj; gepatra reguligado kaŭzas tute alian manion. Iuokaze, mi agadis precipe laŭ inklino. Mi lernis ŝati interalie biologion, astronomion -- kaj fiŝnutradon. La fiŝnutrado ŝajnis stranga okupo al miaj geknabaj amikoj, kiuj preferis fiŝkaptadon, t. n. virecan sporton. Mi analizis la aferon tiel, ke la plej distra aspekto de la fiŝkaptado enteniĝas en tio, ke oni vidas la fiŝon; oni faras tian momentan kontakton kun la mondo de fiŝoj. Ĉar kiu knabo, en civilizita lando, eĉ en Florido, devas kapti nuran fiŝon por manĝi? Miaj junaj kolegoj tre malŝatis la taskon de antaŭkuira preparo; iliaj patrinoj evidentigis saman abomenon. Do mi preferis disĵeti panerojn de boato aŭ ponto, tiel vidante ne sole unu surhoke suferantan fiŝon, sed centojn da liberaj kaj sanaj en natura akvo.

Entute mi ne tre ŝatis la mortigon, speciale de belaj vivaĵoj. Oni diris pri mi, ke mi ne ofendus eĉ muŝon. Homon jes, sed ne muŝon. Kaj tio ne ĉiam estas virto! Amiko unu tagon donis al mi pafilon kaj diris, "Pafu birdon!" "Bone," diris mi, ĉar mi ja fieris pri mia firma celmano, sed mi rimarkis, "Tiu ĉi estas tro belaj; jen, mi pafos tiam buteon tie." Bonorde mi pafis la buteon, kaj oni arestis min pro legrompo, ĉar buteoj estas purigaj birdoj...

Sed reen al la temo. Beno estis, ke pro frua neceso laboradi kaj porti respondecon, mi maturiĝis sufiĉe baldaŭ, ke mi povis solvi gravajn problemojn kaj ignori negravajn. Kompreneble, mi ignoris pli ol mi solvis; nun retrospektive mi scias, ke mi maturiĝis tro baldaŭ. Ĝuste tio kaŭzis la malbonŝancon pri la taglibro. Ĉar ĉiu sperto estis specifajo; kiel unuigi ilin en harmonian vivspertadon, kio havus signifon?

Pro longdaŭra deviga izoleco de formala edukado, dum kiu periodo mi studadis kaj legadis sendirekte kaj akiris konon pri multaj, en praktika senco senutilaj aferoj, mi rigardis min tro serioze kaj ofte starigis tiun malsagan demandon, "Kiu kaj kio estas mi?" Al mia tiama, iom naiva spirito ŝajnis memevidente, ke mi trafas eblajn solvojn al tiu demando ĉiutage, sed ne povas kunmeti signifon el tiuj elementoj pro interbreĉoj tempaj kaj humoraj en la kontinuo de la pensado. Ĝuste tiutempe hazarde okazis, ke mi vidis kinofilmon pri la vivo de Leonardo da Vinĉi. Ho malfeliĉa tago! La filmo parte temis pri lia taglibro, en kiu li faris siajn ilustraĵojn kaj skribis inverse, por ke siaj kuntempanoj ne malkovru lian troprogresemon. Tuj fariĝis tiu nobla geniulo mia vivlonga (mi kredis) heroo. Mi pensis: Kio faras geniulojn? Tio, ke ili ne permesas interbreĉojn en la vivspertado, ili neniam forgesas, kion ili hieraŭ aŭ lastjare pensis; unuvorte, ili havas taglibrojn.

Bone: nepre mi devis ankaŭ havi taglibron. Kaj tio pri inversa skribado ege impresis min. Jes, ĉu eble? Kaj mi provis kaj ekzercis min antaŭ speguloj kun granda entuziasmo. Kaj post kelka tempo ja aldoniĝis al mia stoko de senutilaj talentoj ankaŭ la kapablo, skribi inverse... Se nun alia afero. En tiu sama jaruono ekfalis sur la maltrankvilondajn akvojn de mia lando, tute senaverte el klara ĉielo, nova koncepto: Esperanto.

Nu tiu tuta afero pri sekreteco de la taglibra enhavo devenis parte de la filmo, parte de la ideo, ke mi havas ion kaŝindan. Tiel mi vidis min: grandpotenca sorĉisto, princo de nekonataj mondoj. Nun mi scias, ke mi ja havis ion kaŝindan: mian nescion. Sed tion mi efektive ne kaŝis; male, ĝi abundas en la paĝoj de la taglibro mem. Uzi Esperanton kiel kaŝilon estus preskaŭ nepensebla al klerulo, sed ĝuste en tiu rilato mi taksis ĝian valoron. Nu -- kvankam mia lerteco pri inversa skribado jam estis sufiĉe boniĝinta, tamen mi baldaŭ trafis neatenditan problemon: mi ne povis legi tion, kion mi antaŭe skribis. Eĉ per spegulo. Do, jam lerninte, ke Esperanto ne estas bone konata inter miaj plej proksimaj familianoj, mi decidis uzi tiun facilan lingvon en la taglibro. Mi mendis lernolibron kaj studadis, tuj komencante tiulingvan enskribadon.

Mia tablibro estis bele bindita libro, destinita kiel biblio, kion mi trovis en vilaĝa libroboutiko. Ĝi aspektis eksterkovrile kiel ordinara biblio, sed pro ia neimagebla eraro, neniu vorto estis presita sur ĝiaj paĝoj. Mi estis sufiĉe religiema kaj hezitis pri tiu libro, sed fine mi decidis favore, ĉar vakpaĝa libro apenaŭ povas esti biblio, malgraŭ orlitteraj vortoj sur la kovrilo "Sankta Biblio." Krome, mi estis princo de nekonataj mondoj, kaj biblioforma taglibro donus dignecon al la enskribaĵoj.

Sed mi ne longe restis kontenta pri Esperanto, ĉar malgraŭ mia iom unuflanka sinteno al la lingvo, mi post kelkaj monatoj lernis, ke Esperanto ja ĝuas certan gradon de akcepto kiel internacia mondlingvo. Mi pensis: tio ne taŭgas! En venontaj epokoj tiuj unumondanoj malkaŝos ĉion! Mi tiutempe lernis ankaŭ Hispanan lingvon, kaj plibonigis la Germanan, kion mi jam scipovis iom denaske; nun mi provis intermiksadon de la tri lingvoj en la taglibro. Sed tio ne plaĉis; estis kruda, neharmonia. Unu tagon, falis en miajn ricevemajn manojn Ruslingva gramatiko. Ne pensu, ke mi iel sukcesis pri tiu lingvo! Sed mi lernis sufiĉon por plenumi mian intencon: la Cirilan alfabeton. Tuj mi evoluigis sistemon aplikantan tiun enigman sed belaspektan literigadon al Esperanto. Nun la enhavo estus duoble sekreta; legonto devus scii kaj la rusan kaj la Esperantan.

Mia skribmano suferis, ĉar mi devis skribi ĉion preslitere, ne lerninte el tiu malgranda lernolibro la kursivan. Sed tiel mi daŭrigis dum jaroj, skribante jen angle, jen germane, jen hispane, jen Esp-cirile, jen ĉiujn kvar kune. Kelkfoje mi uzis aliajn lingvojn, pri kiuj mi min de fojo al fojo interesigis: i. a. la turkan, la finnan, la latinan (precipe por impresaj devizoj), la portugalan, la nederlandan. Tiujn lastnomitajn kvin mi jam ne povas interpreti, do la "penskontinuo" ne restis senbreĉa, malgraŭ la strebado. Kaj la fina rezulto de la tuta stultaĵo estas, ke mi kun, ni diru, sesdek jaroj, ne povos legi eĉ la anglan -- aŭ pliĝuste ne volos legi ĝin.

Kaj tio estas grava punkto. Se vi havas taglibron, vi bone scias, kia turmento estas, privilegi pasintajn okazaĵojn, malnovajn pensojn de la juneco kaj de la adoleskeco. Kredu min -- la naturo provizas tiujn interbreĉojn, pri kiuj mi min tiom ĝenadis, por ke la homo konsciis la nunon kaj forgesu la fuŝitan pasintecon. Kaj ĉu fremdlingvojn en taglibro? Mi nun trovas, kaj oni devas konstati, ke la menso ne direktas la skribadon, sed la skribado la menson. Ĉar, krom se oni bonege konas la fremdlingvon, oni tendencas uzi tiujn esprimojn kaj vortojn plej facile penseblajn, kaj ne vere esprimas sian ideon. Eĉ en nacia lingvo... sed tio ja estas alia temo.

Jes, mi ankoraŭ havas la taglibron... la saman. Oni ne povas forĵeti tiajn. Ĝiaj sulkaj paĝoj elfalas, la kovriloj disfendiĝas iom post iom, la inko multlingva sur la unuajn paĝoj estas ŝmirita ĝis nelegebleco, kaj mi ankoraŭ ŝmiras la freŝajn foliojn per inko kaj grafito senĉese. Mi ja ofte volis forigi la monstraĵon; ĝi prezentas min nepre en plej malflata lumo... tamen en tiu rilato ĝi similas al la vivo mem, ĉu ne? Kaj oni vere ne povas forĵeti tiajn...

ALIĜU AL JEN

ALIĜU AL ELNA

ALIĜU AL UEA

LA BOLŜOJ-BALEDO EN NOV-JORKO

La Bolŝoj-Baledo estas reveninta! Ĝi estas eble la plej fama dancistaro en la tuta mondo --- kaj pro bona kaŭzo. Ĉio, kion ĝi faras, ĝi faras kun amoplena zorgemo... ambaŭ la bonan kaj la malbonegan, ekzemple Spartakus.

Giselle, unu el la plej malnovaj romantikaj baledoj, estas la plej bona baledo en la Bolŝoja repertuaro dum la nuna sezono en Nov-Jorko. Mi nur spektis unu dancistaron, Marina Kondratjeva, kiu dancis ĝin belege. En la unua akto ŝi estis gracia, sed sanemocia kaj senelktra. Pro tio eble ŝi faris pli bone en la dua akto, en kiu ŝi dancis rolon de mortinta spirito.

En tiu akto dancis F-ino Kondratjeva belege. Oni vere povis kredi, ke oni vidas mortantaron... ŝi estis kiel aero. Nekredeble! Oni vidis ŝin ankaŭ en baleda lernejo kun Maja Plisetskaja, la mondfama soloistino de la aro.

"Les Divertissements" estis la plej bona programo en la repertuaro. F-ino Plisetskaja dancis "La Mortantan Cignon" tiel belege, ke post ĉiu prezentaĵo ŝi devis danci denove pro bisoj. Unu vesperon ŝi dancis trifoje!

Kaj pri Spartakus --- eble estus pli bone, se oni ne pridirus ĝin. Ĉu vi iam vidis la filmojn de Cecil B. DeMille? Ĉu vi povas kredi, ke kelkfoje estis sur la estradoducant gedancistoj samtempe? Oni povus diri, ke tio estis baledo prezentita laŭ Hollywood-maniero, kun sia "cast of hundreds" (ludantaro de centoj).

Nun iom pri nia deziro komuniki kun la gedancistoj post la afero. Ni ne povis! Kial, vi demandas? Ĉar ni ne havis komunan lingvon! Ni ne povis paroli la rusan aŭ la germanan, kaj ili ne scipovis la anglan aŭ la francan. Nin tre efikis iliaj prezentaĵoj, sed ni ne povis fari al ili komplimentojn.

Ĉu mi devas mencii la moralajon de la rakonto... ?

--- Josefo Fulmo

DUA FESTETA VESPERO DE JEN

okazos ĉe S-ro Bernardo Stollman, 526 W. 112th St.
je la 2a posttagmeze la 22an de Oktobro
(por invititoj)

vendredon, la 19an de Oktobro 1962

7:30 vespere

okazigos Esperanto-Asocio de Nov-Jorko

RAPORTOJN PRI NACIAJ KAJ INTERNACIAJ
ESPERANTO-KONGRESOJ 1962

Parolantoj: la membroj

ĉe Sloane House, Y.M.C.A., 356 West 34th St.,
Salono "D." Antaŭa vespermanĝo havebla en la kafeterio.

La sekvanta kunveno de la Asocio okazos:

vendredon, la 16an de Novembro 1962

7:30 vespere

VIZITO AL RESPUBLIKO DOMINIKANA

Parolanto: S-ro John L. Lewine

ĉe Y.M.C.A., sama adreso

MI DANKAS al S-ro Joĉjo Silverman, kiu konsentis neoficiale (sed tamen dankende) servi al nia klopodo kiel "konsilanto kaj konsolanto", kaj al kies lerteco ŝuldiĝas fina poluro de kelka enhavo.